M * Expédié par Boucon
Dem^t à Annecy
Boulevard du Lycée No 10
* L'inscription du nom et de l'adresse de l'expéditeur est facultative.

RÉPUBLIQUE FRANÇAISE

# CARTE POSTALE

*Ce côté est exclusivement réservé à l'adresse.*

ANNECY
H-SAVOIE

M Sinjoro Peano
Profesoro ĉe l'Universitato de Torino
Cavoretto Torino (Italujo)
Italie

324

Annecy la 19an de februaro 1914

Altestimata Sinjoro,

Mi tre kore dankas vin por la sendo de la 100 exemplo de Interlingua, kiujn mi legis kun granda intereso. En pluraj punktoj vi estas prava, kaj la futura lingvo internacia devos profiti de kelkaj el viaj principoj. Jam Esperanto pli kaj pli latinigas enlasante novajn vortojn kiel stuporo, prato, rodi, hororo, sekura, fugi, flikti, kontesti, tenera, stulta kaj multaj similaj. — Mi komunikis vian broŝuron al iaj kolegoj miaj; sed, ha, Dio mia! ilin ni neniam kontentigos; Esperanto ne plaĉas al ili kaj Interlingua, ili diras, nur kripligas la belan lingvon latinan. — Mi sendas al vi la verkon de S^ro Tiĥomirov, kiu, kiel Idistoj, volas reformi Esperanton; li tamen ne estas tiel trudema kaj aŭtokrata kiel S^ro Couturat; vi vidos ke li ankaŭ komplikas la lingvon.

Kun alta estimo kaj rea danko,

Samideane Via.

Boucon